

Eŭropa Bulteno

Oktobero 2013, Numero 131

FAKA LITERATURO EN ESPERANTO

Ofte oni riproĉas al Esperanto la nekapablon plenumi sian rolon de internacia lingvo pro tio ke ĝi ne posedas necesan kvanton da fakaj vortoj por la nuna mondo. En la plej ampleksa oficiala vortaro PIV troviĝas iom malpli ol 50.000 leksikaj unuoj dum ekz. la plej ampleksa angla vortaro konsistas el 500.000 vortoj. Kiel povas tiel nekompleta lingvo kontentigi la bezonojn de la internacia lingvo, kiun jam plenumas la angla?

Logike ĉiu lingvo havas tiom da vortoj kaj fakaj terminoj kiom ĝia uzantaro bezonas. Esperanto ne estas uzata kiel ŝtata lingvo kaj malgraŭ tio ke ekzistas ducento da fakaj vortaroj, plej ofte eksmodiĝintaj ĝi vere ne posedas evoluiĝintan terminaron por lingvaj kampoj kiuj kovras tipe ŝtatajn aferojn: armeaj terminoj, administraciaj, juraj, ekonomiaj. Ni krome ne havas industrion kaj sekve mankas amaso da terminoj necesaj en produktado de industriaj varoj kaj ni ankaŭ ne havas lernejojn kaj sekve mankas lernejaj lernolibroj por preskaŭ ĉiuj studobjektoj lernataj en la bazaj kaj mezaj lernejoj. Esperanto de komenco estis lingvo de emocioj kaj tuj ekevoluis ampleksa vortaro necesa por literatura proza kaj poezia kreado, esperantistoj okupiĝas pri lingvoj kaj ni havas kontentige evoluintajn lingvistikajn terminojn, Esperanto estas lingvo de turismo kaj ni havas ege evoluintan turisman vortaron ene de multegaj turismaj prospektoj kaj libroj. Kadre de tio ekzistas ankaŭ sufiĉe bona stato de geografiaj kaj historiaj terminoj ankaŭ necesaj en turismo. Esperanto estas lingvo por vojaĝantoj, do ni havas fervojajn terminarojn ampleksajn kaj altkvalitajn, kaj laste ni havas tre bone evoluintan terminaron pri moderna informadika teknologio, ĉar ni ege ĝin uzas en nia komunikado.



Tamen, malgraŭ la fakto ke ne ekzistas lernejoj en kiuj oni uzas fakajn lernolibrojn, fojfoje okazas ke fakuloj tradukas aŭ eĉ verkas fakajn lernolibrojn en Esperanto. Troviĝas plurdeko da tiaj kaj la lasta ekzemplo estas tre bona duvoluma lernolibro pri fiziko de Walter Bernard <http://esperantosudtirolo.wordpress.com/tag/fiziklibro/>

Pri tio feliĉe ekzistas unuloke serĉebla arkivo, kiun prizorgas Laszlo Szilvasi S.T.E.B (Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko) ĉe www.ezperanto.hu kaj en kiu enestas ĉirkaŭ 5000 unuoj.

Jam pli ol 100 jarojn regule aperadas La Scienca Revuo kies baza tasko estis aperigi fakajn tekstojn kaj zorgi pri evoluado de faka terminaro. En la E-historio ekzistis centoj da fakaj revuoj kaj kelkaj ekzistas ankaŭ nuntempe. Sed absolute senprecedenca estas agado de esperantistoj en vikipedio. Cento da personoj daŭre redaktas esperantan vikipedion kiu nuntempe jam enhavas preskaŭ 200.000 artikolojn ĉefe fakajn. Ĝi havas laŭnombre pozicion inter 30-a kaj 40-a inter ĉiuj mondaj lingvoj kio signifas ke ĝi estas pli riĉa ol aro da grandegaj lingvoj.

Sed tio per kio ni povas daŭre fanfaroni, ke ni havas grandegan fakan literaturon estas la rezulto kiun liveras al ni la laboro de d-ro Eckart Bick, kiu produktis por Suddana Universitato tradukmaŝinon kiu aŭtomate tradukas la kompletan anglalingvan vikipedion al la dana kaj Esperanto. En la dana ĝi ne estas ankoraŭ kontentige bona sed en Esperanto ĝi estas surprize kvalita. Oni povas diri ke preskaŭ ne ekzistas frazo tradukita de tiu maŝino al Esperanto kiu ne estus komprenebla. Kaj imagu, WikiTrans en Esperanto jam entenas 4 milionojn da vikipediaj artikoloj! Konsistanta el pli ol 20 milionoj da faktekstaj paĝoj. Pri ĉio kion verkis anglalingvanoj en vikipedio oni nun povas legi ankaŭ en Esperanto. Kiu povas aserti ke ni ne posedas fakan literaturon?

Zlatko Tišljarić

LA PREZIDANTO DE EEU EN POLA KONFERENCO DE LINGVOINSTRUISTOJ

La 27-an, kaj la 28-an de septembro mi havis en Pollando (Lodzo) 3 prezentojn al la jara konferenco de 750 polaj instruistoj de la angla lingvo. Ĉi-tie vi povas vidi la parolantojn: <http://iatefl.org.pl/lodz2013/meet-some-of-our-speakers>.



instruistino, Anna Galucka, diris "Ni ĉiuj lernu Esperanton!" kaj ili ĉiuj aplaŭdis. Mi donis al ili la adreson de lernu.net.

1. Unue, ili invitis min malfermi la konferencon vendredon la 27-an de septembro per prelego de 45 minutoj. Mi parolis libere, kiel ĉiam. Ne estis diskuto, sed ili ege pozitive reagis, aparte fine kiam mi kantis la eŭropan himnon en Esperanto. Ili ankaŭ multege aplaŭdis post la pollingva parto de mia prelego.

2. Dum plena horo matene sabaton mi neformale respondis al demandoj de 30 gejunuloj, parte en la angla, sed plejparte en la pola. Fine la ĉeforganizantino kaj ankaŭ

3. Vespere sabaton mi havis diskuton kun ĉirkau 60 geinstruistoj kiuj speciale interesiĝis pri mia temo. Estis tre bona diskuto kaj neniu kontraŭis la ideon. Aliflanke mi ne trovis konkretan lernejon kiu ŝatus jam nun aliĝi al programo kiel S2L. Sed multaj alparolis min neformale, gratulis min pro la prezento, kiu "tiom malsamis de ĉiuj aliaj prezentoj", kaj diris ke ili certe konsideros la ideon de lernfaciliga Esperanto.

4. Mi poste sendis mian skribitan tekston al Anna Galucka kaj petis ŝin transdoni ĝin al ĉiuj partoprenantoj, kun peto ke instruisto kiu ŝatus partopreni programon kiel S2L kontaktu min. Dum la konferenco ŝi konsentis fari tion.

Seán Ó Riain

BUDO PRI ESPERANTO EN LA CENTRO DE BUDAPEŝTO

Sur la Deak placo en la centro de Budapeŝto la anoj de la hungara EDE (Europo Demokratio Esperanto) faris la 12-an de oktobro 2013 informtablon kun afiŝoj en bonvidebla tendo. En la diskutoj kun la pasantoj emfazis la EDE-anoj la politikecon de la lingva problemo en Eŭropa Unio kaj alvokis al aktiva internacia subteno de civitanoj por demokratia solvo, konkrete venontjare ĉe la EU-Parlamentaj balotoj.



Ĉe belege aŭtunsuna vetero restis multe da interesuloj el diversaj landoj de la mondo, sub nia tendo. El, Hispanio, Paragvajo, Brazilio, Usono, Japanio, Rumanio, Slovakio, Kroatio, Aŭstrio, Italio, Francio kaj eĉ ni sukcesis ricevi el Germanio 2 subtensubskribojn por la partopreno de la Germana EDE 2014 ĉe la EU-balotoj.

Nia teamo mem estis internacia kaj niaj informantoj parolis kelkajn lingvojn. Ekzemple Kaszas Attila povis ĝuste brili kun liaj 14 bone parolataj lingvoj. Nekredeble, li parolis kun italoj eĉ en la lingva melodio kaj same portugale kaj hispane. Li preskaŭ kvaronan horon konvinkis Usonanon en flua angla, ke lia lingvo malgraŭ ĉiu beleco, ne taŭgas por demokrate internacia lingvo. Andrea Ruzicska, la prezidantino de la hungara EDE, informis la pasantojn angle kaj hungare. Wacha Balazs, mem lingvisto, estis preta, kiel ĉiam, por altnivela lingvosciensa diskuto, ankaŭ en la rusa lingvo. Gados Laszlo, lingvisto, alprenis kaj disdonis lian kajeron, el esperanto al hungara tradukitajn okazadojn en esperantujo ĉi-jare. Eugen Macko varbis inter germanaj turistoj por subtensubskribo okaze de la EU-balotoj en 2014 kaj inter hungaraj demokratie malfermitaj civitanoj, ke ili ne forgesu subteni la tradicie riĉan Hungaran Esperanto-movadon.

Eugen Macko

OMAĜA RENKONTIĜO AL TIBOR SEKELJ

La homoj ĝenerale ne ŝatas tombejojn kiuj nin memorigas pri nia efemereco. Sed de tempo al tempo vizito al iu tombejo povas esti por nia menso tre agrabla kaj utila. Tiel okazis ankaŭ la 21-an de septembro 2013. kiam 36 esperantistoj el Subotica, Senta, Mali Idoŝ kaj Beograd kunvenis en Baja-tombejo en Subotica por omaĝi la 25-an datrevenon de forpaso de nia kara Tibor Sekelj: esperantisto, humanisto kaj samideano.



Ni ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ malgranda, bela, blanka monumento en la loka aleo de merituloj. La posttagmeza, jam aŭtuna suno milde brilis, la venteto susuris, ĉie abundis diversaj koloroj, sur la fono de verda herbo kaj arbofoliaro, kovrita per blueco de firmamento. Por momento ekregis silento. Ĉiuj rigardis la simplan monumenton, freŝe ornamitan per floroj, kun la nomo de nia samideano, datoj de lia naskiĝo kaj forpaso, kun du vortoj kiuj trafe karakterizas lin, lian tutan vivon: mondvojaĝanto... verkisto... En tiu momento de solena silento la nuneco kaj eterneco kvazaŭ kuniĝis, fariĝis unuo. La spirito de nia forpasinta samideano ŝvebis inter ni. Eksonis la himno de Esperanto. Bele kantis la junulino Andrea Csóke (Andrea Ĉeke), nia akompano sonis iomete necerte, timeme, sed ĉiu vorto kaj tono elfluis el nia koro. Poste la vidvino de forpasinto, sinjorino Erzsébet Székely (Erĵebet Sekelj) prenis la vorton. Ŝia parolo estis, kiel ĉiam ĉe tiuj okazoj tre sincera, tre varma, tre kortuŝa.



Ni adiaŭis la spiriton de samideano kaj ekiris al la Malferma Universitato, kie ni daŭrigis nian solenan kunvenon. La junulino Blanka László (Blanka Laslo), lernantino de muzika mezlernejo, ekludis sur violonĉelo la Preludon de J. S. Bach (Cello Suite No. 1). Ĉiela harmonio plenumis la spacon.

Gesamideanoj Erzsébet Székely (Erĵebet Sekelj), Ljiljana Sekelj-Milenković (Ljiljana Sekelj-Milenković), Magdolna Rövid (Magdolna Revid), Đorđe Dragojlović (Djordje Dragojlović) legis la fragmentojn el verkoj de Tibor Sekelj kaj deklamis vaste konatajn poemojn, sed ankaŭ unu poemon ĝis nun ĉe ni nekonatan, sub titolo „Homojn!“, kiun Sekelj verkis verŝajne en Argentino, en 1939, antaŭ la Dua mondmilito. Poste, kelkaj el ĉeestantoj revivigis siajn rememorojn pri Tibor Sekelj. El tiuj mallongaj epizodoj ili ĉiam emfazis lian spiritecon, humuron, homkomprenemon.

INTERNACIA SEMINARIO PRI LA DANUBREGIONA STRATEGIO DE EU

Sub la titolo Danuba Panoramo internacia seminario okazis pri la Danubregiona Strategio de EU (EUDRS) en Budapeŝto (Hungario) la 19-an de oktobro 2013. Tio estis ligita al la Jaro de Eŭropaj Civitanoj (2013). Ĉeestis pli ol 60 reprezentantoj de civilaj organizoj el naŭ landoj (Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Kroatio, Rumanio, Serbio, Slovakio) por diskuti, kiel ili povus kontribui kadre de la Danubiana projekto al la realigo de la Danubregiona Strategio de EU. La diskuton helpis samtempa interpretado.

Rimarko: Pri la esenco de la Danubregiona Strategio informoj aperis en la Eŭropa Bulteno en 2011. (EB-102-02-2011.)

La seminarion malfermis Miklós Barabás, direktoro de la Európa Ház (Eŭropo Domo, Budapeŝto), gastiganto de la aranĝo. Li faris menciojn pri la laŭtemaj eventoj okazintaj en la antaŭaj jaroj, poste li konigis la esencon de la Danubiana projekto.

D-ro László Flamm, Hungario, prelegis pri la rolo de makroregionaj strategioj. En lia parolo li faris ankaŭ komparon inter la Balta Mara Strategio kaj la Danubregiona Strategio.

Christiana Weidel, Aŭstrio, en sia prelego per ekzemploj ilustris la rolon de la Danubo en la vivo de homoj. Krome ŝi parolis pri la konfliktoj inter la medioprotektaj kaj la ekonomiaj interesoj, pro kio ne estas simple akiri rezulton fare de civilaj organizoj.

Stanka Parac, Serbio, konigis la novaĵon, ke Serbio ricevis pozitivan prijuĝon de EU, tial baldaŭ povos komenci intertraktojn kun EU pri la aliĝo de Serbio. En la aŭskultantoj grandan intereson vekis tiuj konkretaj ekzemploj, per kiuj ŝi prezentis la diversajn eblojn pri tio, kiel oni povas realigi tralimajn kunlaborojn inter lokaj aŭtonomioj kaj instancoj. Ŝi diris ke lingvaj problemoj malhelpas la kunlaborajn projektojn tra landlimoj („hungaroj ne parolas la kroatan, kroatoj ne parolas la hungaran, la anglan nek unu nek alia”).

La prelegantoj ricevis multe da demandoj, al kiuj donitaj respondoj estis sufiĉe konkretaj kaj ili vastigis la informatecon de la ĉeestantoj. En la lasta etapo de la seminario okazis prezento kaj diskuto de deklaro, en kiu la partoprenantoj apogas la estigon de la Danuba Civila Socia Forumo, kiu estis proponita en la fazo de opiniado pri la strategio. Ili konsideras la Danubregionan Strategion de EU utila iniciato, kiu estas taŭga: por konigi la ideon kaj politikon de EU, por la fortigo de la komuna Eŭropa konscio kaj projekto, por la redukto de la distanco inter la civitanoj kaj la EU-institucioj. La partoprenantoj de la seminario akceptis la deklaron, kiu enhavas la celojn kaj agadmanierojn de la Danubiana projekto, kiu ĉi lasta volas kontribui al la estigo de Danuba Civila Socia Forumo.

Konvinko de la seminariaj partoprenantoj estas, ke la spirito kaj la rezulto de la ĉi-jara forumo de EUDRS (Bukareŝto, la 28-29-an de oktobro 2013.) movos antaŭen la realigon de la Danuba Civila Socia Forumo. Ĉi tiun procezon volas antaŭenigi ankaŭ la Danubiana projekto. Kvankam en la daŭro de la mallonga seminario oni nur tuŝis lingvoproblemon, tamen tiu ekzistas sur lokaj niveloj apud la landlimoj, kiun situacion esperantistoj eble devus ekzameni.

László Gados

REZOLUCIO DE LA EŬROPA PARLAMENTO POR PROTEKTI MINORITATAJN LINGVOJN EN EŬROPO

Le rezolucio estis aprobita la 11-an de septembro 2013. Ĝi rilatas ne nur al 24 oficialaj naciaj lingvoj en EU, kiuj ja estas ankaŭ minoritataj ekster la hejmlandoj, sed ankaŭ al lingvoj de migruloj, tamen ne al neŭtrala internacia lingvo kiel Esperanto.

Sed dank al niaj verdaj geamikoj el Francio kaj Catherine Grèze (MEP) oni diskutis pri Esperanto. En la diskuto ene de la interfrakcia grupo la pli dekstraj partioj kontraŭis ĝin, la socialistoj sindetenis - kaj subtenis ĝin nur la Verduloj kaj Regionalistoj. Ĉiukaze la rezolucio kongruas kun la baza filozofio de Esperanto pri la egalvaloro de ĉiuj lingvoj.

Kvankam mi ne estas lingva fakulo, mi opinias ke la e-movado devus klopodi por atingi la agnoskon kiel 'minoritata lingvo', laŭ la citita rezolucio kaj laŭ la "Eŭropa Ĉarto de la regionaj kaj minoritataj lingvoj" de la Konsilio de Eŭropo, aprobita en 1992.

Jen la akceptita rezolucio en 24 lingvoj:

<http://www.europarl.europa.eu/sides/getDoc.do?pubRef=-//EP//TEXT+TA+P7-TA-2013-0350+0+DOC+XML+V0//DE>

Manfred Westermayer

VALENCIA ESPERANTO-RENKONTIĜO 2013

Inter la 21-a kaj 23-a de junio okazis en Olivo (Valencio) la Valencia Esperanto-Renkontiĝo 2013, internacia renkontiĝo kiu okazas ĉiujare en malsama loko de Valencilando. Konstatu mem kiel iris la afero kelkajn monatojn antaŭe per la reklama video.



Ĝin kaj la renkontiĝon mem aranĝis eta grupo da junuloj kiuj eĉ ne partoprenis antaŭe iun Esperanto-renkontiĝon, sed tio ne gravas, ĉar la renkontiĝo ja okazis, malgraŭ la onidiro de pluraj homoj kiuj pensis ke ni ne kapablos pro leĝaj aferoj, manko da rimedoj kaj tempo... multaj problemoj. Ja eblis, ĉar idealoj estas super ĉiuj limoj kaj ebloj.

Partoprenis pli ol 60 homoj venintaj el pluraj partoj de Hispanio, el Italio kaj Germanio kaj de ĉiuj aĝoj. Ĉu vi volas pruvon? Ĉu vi demandas vini kion ni faris? Sciinte ke la renkontiĝo

okazas samtempe kun la loka festo kaj ke post ĝi estos alia festo, Fajroj de Sant Joan, kaj krome ke Olivo estas tre proksima al granda urbo, Gandio, ni faris krom tio kio estas evidenta: prelegojn (ekzemple, pri vide-ludoj), pentrafekspozicion, montron de valenciaj vestoj, vino-gustumadon, ludojn surstrande, grupan dancadon, surprizojn, konkurson de poezio, turisman viziton gviditan, ktp.

Ni krome profitis la okazon por prezenti la Valencian Esperanto-Asocion kaj novajn projektojn. Ni volas danki la partoprenon, helpon kaj kunlaboron de multaj homoj kaj pluraj asocioj: al ĉiuj partoprenintoj, la Kataluna Esperanto-Asocio, la Hispana Esperanto-Federacio, Miguel Gutiérrez, membroj el Oliva Esperanto-Klub' kaj unue al la Valencia Esperanto-Grupo pro la propono aranĝi ĝin. Sed certe estas tiom da homoj... :)

Mi persone volas danki la eblon fari ĉion ĉi kaj plurkiale precipe al Juan Vicente Mengual, Vicente Faulí, Marc Rausell, José Luis Torres, Daniel Rocher, Pepe Añó, Ana Manero, Ferriol Macip kaj Michael Boris. Dankon pro ĉio.

Enric Baltasar

UNUA E-KURSO SUR CIPRO



La 1-an de oktobro komenciĝis en Cipro la Unua kurso de esperanto en lernejo. Instruas Roberto Pigo, instruisto devenanta el Italio kaj nun vivanta sur Cipro.

La kurso okazas en la liceo "Santa Maria" en Limasolo, unu el la plej antikvaj kaj prestiĝaj lernejoj de la insulo. Partoprenas 11 junulinoj.

Renato Corsetti

BULGARAJ GELEARNANTOJ EN ITALIO

Geleernantoj kaj geinstruistoj de lernejo "Canko Cerkovski", urbo Polski Trambesh, Bulgario revenis hejmen post vojaĝo al Italio, kie inter 13-a kaj 22-a de oktobro ili partoprenis en la tria laborrenkontiĝo kadre de la eŭropa projekto "La diversaj profesioj – transformi la provokojn en eblon realigi siajn revojn". En la itala urbo Lucca renkontiĝis reprezentantoj de lernejoj el Bulgario, Italio, Rumanio, Litovio kaj Germanio. La projekto estas financata de EU per 20 000 eŭroj por ĉiu partoprenanta lernejo. La laborlingvo de la projekto kaj lingvo de la komunikado estas Esperanto.

La laborprogramo de la semajno inkluzivis renkontiĝon kun vera napola picisto, kiu prezentis antaŭ la geleernantoj kaj la instruistoj la sekretojn de sia laboro, vizito al firmao por reciklado kaj farmo por bovinoj kie ni vidis kiamaniere funkcias la laboro tie. Poste ni gustumis jogurton, fromaĝon kaj mocarela-fromaĝon preparitajn de la dommastroj.



La gelernantoj kune ellaboris panelojn pri siaj landoj, konkuris en kvizo “Kion mi scias pri la profesio de...”, diskutis laŭ la temo “Kiaj estas la eblecoj trovi deziratan laborlokon en aliaj landoj de EU”. La sciojn pri Esperanto – pri la lingvo de la komunikado, ni havis eblecon plibonigi sub la gvido de niaj instruistoj - Gražina Opulskienė, Christof Krick kaj Mariana Genčeva.

De la ronda tablo “En kiuj universitatoj mi povas lerni, se mi volas daŭrigi mian studadon eksterlande” ni eksciis, ke ni povas elekti inter ĉiuj universitatoj en la landoj de EU, se ni deziras tion kaj se ni estas pretaj lerni multe.

Krom la lernado kaj multaj taskoj ni havis eblecon konatiĝi kun la historio de Italio. Ni vizitis la belegajn urbojn Lucca, Viaregho, Florenco, Pisto kaj Romo. Kaj ni ĉiuj scias, ke iam ni denove revenos en Italion, ĉar tie jam atendos nin niaj novaj geamikoj!

Mariana Genčeva

DISVASTIGO, RETGAZETO APERANTA ANKAŬ ESPEANTLINGVE



Disvastigo estas informservo, iniciatita fare de itala esperantisto Giorgio Bronzetti, kies morala heredaĵo pluvivas dankon al subteno de

Itala Esperanto-Federacio. Laŭ liaj vortoj "spite al pli ol 100jara ekzisto Esperanto, kiel lingvo kaj kiel valoro, estas nekonata aŭ tute miskonata. La imago kiu disvastiĝis ne kongruas ĝenerale kun la efektiva konsisto kaj potencialo de la projekto Esperanto. Tiu projekto signifas por ni antaŭ ĉio proponon al internaciaj instancoj de rimedo por defendo de lingvoj kaj kulturoj kaj, en la aplikado kaj uzo ekde ĝia naskiĝo ĝis hodiaŭ, transnacion mondkoncepton kaj inklinton al komprenemo". Pro tio, ekde ĝia apero, Disvastigo informas itallingve pri Esperanto kaj pri komunikadaj problemoj (diskriminacioj, progresoj, ktp.).

La informservo nun celas atingi du publikojn kaj liveri al ili novaĵojn ĉefe, sed ne nur, el la

vidpunkto de esperantistoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj. Plue, ĝi proponas sian sperton, kunhavigante la eldonitan artikolaron al la internacia movado. Tial, jam de kelkaj semajnoj, Disvastigo havas regule ĝisdatigatan esperantlingvan version (<http://divvastigo.esperanto.it/index.php/eo-eo/>) kaj invitas ĵurnalistojn al kunlaborado.

Hèctor Alòs i Font

LA KVINSTELA MOVADO TRUDAS LA ANGLAN DEVIGE EKDE LA INFANLERNEJOJ

Per elekto ideologie kaj pedagogie sensenca la Kvinstela Movado enigis amendon en Leĝdekretan (LD) pri instruado, aprobitan la 31-an de oktobro ĉe la Itala Ĉambro de la Deputitoj, per kiu oni trudas la instruon de la angla ekde la infanlernejo en aĝo en kiu la infanoj kapablas ankoraŭ nek legi nek skribi, kaj en urbaj medioj en kiuj jam multaj infanoj naskiĝintaj de enmigrintaj familioj ankoraŭ ne kapablas paroli itale. La frutempa lernado de lingvo povas ja okazi en la infanaĝo, sed nur se oni estas elmetataj masive al la lingvo lernota, ekzemple ĉar ĝin parolas la gepatroj. Tio certe ne povas okazi je la nivelo de urbaj infanlernejoj, kiuj tute ne havas taŭgajn strukturojn kaj personaron. Konklude okazos, ke oni pasigos al la infanoj tutajn horojn antaŭ anglalingva televido.

Asocio Nitobe kondamnas lingvan politikon demagogian, antaŭenpuŝatan de ŝtataj responsuloj nekompetentaj kaj senspertaj. Temas pri lingva politiko kies sola rezulto estos probable la entrudo en la mensojn de la infanoj kaj de la gepatroj, ke ekzistas nur unu fremda lingvo kiun penvaloras lerni (la angla, la aliaj lingvoj estas ekskluditaj de la LD), kaj ke naskiĝi kun lingvo malsama (itala aŭ alia) estas handikapo korektenda kiel eble plej frue, startante ĝuste de la infanlernejo.

Rimarko de la redaktoro: Kvinpinta Movado estas nova partio en Italio kiu estis per kvarono de voĉoj elektita en Italian Parlamenton dum la lastaj balotoj kiel reago de la popolo kontraŭ korupto en Italio. Ĝi nun agas kiel opozicia partio kun granda povo.

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 10-an de novembro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Eugeno Macko, Ivan Kujundžić, László Gados, Manfred Westermayer, Enric Baltasar, Renato Corsetti, Mariana Genêva, Hèctor Alòs i Font, Disvastigo.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

